Survoje al La Chapelle ni haltis ĉe Rennes, iama ĉefurbo de Bretonujo, por pikniklunĉi en belegaj ĝardenoj de Thabor, kie situas grandskala kolombejo kaj birdejo. Poste ni promenis laŭ la urbo. Tamen la butikoj restis fermitaj pro la feritago, dum la loĝantaro marŝis surstrate kun flagoj kaj granda bruoj.

Genisto reĝa

La vojaĝo daŭris tra bela pejzaĝo, vera verdaĵo de kamparo, arbaroj kaj herbejoj. Ni spektis flanke de la ŝoseo flavan planton 'genisto' (franclingve *genêt*) kaj eksciis, ke tiu planto estas historie simbolo de la *Plantagenêt*-aj reĝoj.

Malnovaj geamikoj

Je la 4-a ptm en La Chapelle ni renkontis la ĝemelurbestron kaj gastigantojn, kiuj donacis al siaj gastoj konvalon. Ni ĝuis trinkaĵon en la urbodomo antaŭ ol rigardi la hison de la brita flago ekstere en la korto. Poste la gastigantoj veturigis la gastojn por resti en diversaj hejmoj tra la urbeto kaj en najbara urbo Herbignac, kie ni loĝis dum la vizito kun Esperanta paro Jean-Yves kaj Maryvonne, geamikoj de Edith ekde renkontiĝo antaŭ dek jaroj ĉe Kvinpetalo, Boursesse.

Saluton el Skipton

Ni rigardis belan ĝardenon kaj kamparan ĉirkaŭaĵon, kie ili prizorgas kokojn, du ĉevalojn, hundeton kaj katon. Jean-Yves kaj Maryvonne bonvenigis nin per bongusta vespermanĝo (Maryvonne estas profesie kuiristino), je kiu okazo ni transdonis al ili salutkarton de nia Skiptona Esperanto-Grupo kaj donacis aĵojn de nia regiono.

Vendredmatene la 2-an de majo ni grupiĝis ĉe la buso por vojaĝi al la urbo Nantes, kie unue ni vizitis eksŝipkonstruejon kontraŭflanke de rivero Loire. La granda hangaro iĝas 'Muzeo de Maŝinoj', kie oni inventas kaj fabrikas gigantajn mekanikajn maŝinojn, ekzemple elefanton, kiu povas marŝi, trumpeti, ŝpruci akvon kaj movi ĉiujn partojn kiel vera besto. Homoj

povas pagi por eniri supren en la elefanto kaj ĝui ĉirkaŭiri Nantes dum ĝia ĉiutaga marŝado tra la urbo. Oni diras, ke en la metiejo ili konstruas grandegan araneon por partopreni festivalon en Liverpool.

Post pikniko en belega parko francparolanto ĉiĉeronis laŭ la katedralo antaŭ ol eniri la kastelon de la dukoj de Bretonujo. Jean-Yves, nia gastiganto, bone tradukis ĉiujn detalojn Esperante, ĉar ni du ne estas francparolantaj, do vice mi tradukis angle por komprenigi al ceteraj kunvojaĝantoj, kiuj ne scipovas la francan. Komunuma vespermanĝo en la urbodomo kun bretona muziko, kantoj kaj popoldancado atendis nian revenon el Nantes; preskaŭ cent personoj partoprenis grandan feston, kaj okazis oficiala ĝemelurba grupfoto.

La sekvan tagon, sabate, ni iris grupe per buso al enmurigita, keltdevena urbo Guérande, kiu estas la sola mezepoka urbo kun konservitaj remparoj en Bretonujo. Ni piediris tra mallarĝaj stratetoj kaj rigardis vidindaĵojn. Guérande superrigardas al du kontrastaj pejzaĝoj, tiu de la natura rezervejo 'La Grande Brière', kaj tiu de la salmarĉoj, kaj estis la lasta, la Guérande-a duoninsulo, kien ni ekskursis por viziti salrikoltejon 'Sel de Terre'.

Tie, la gvidistino, kies praavoj havis la genian ideon rikolti altkvalitan marsalon, montris al ni vastan areon por venigo de marakvo, kiu elvaporigas kaj postlasas tiun bezonatan salon. Ankoraŭ nun la salon oni rikoltas sen maŝino. Jean-Yves verkis informilon Esperantlingve kun desegnaĵo por priskribi la rikoltadon en tiuj vastaj basenoj kun labirintaj fluejoj.


Kunmanĝi en Esperanta etoso

La vetero varmiĝis, kaj ni troviĝis en marborda urbo Le Croisic, kie ni ĝuis bongustajn glaciaĵojn dum promonado laŭ la haveno antaŭ ol reveni al niaj gastigantoj por vespermanĝi inter esperantistoj de Herbignac. Krom respondeci pri SAT-agado, Jean-

Yves ĉiusemajne gvidas la Esperanto-grupon ĉe Esperanto-centro, do li invitis membrojn por renkontiĝi kaj kunmanĝi en bonkora Esperanta etoso.

Hazarda Esperanta parolo

Dimanĉon matene ni veturis per aŭto ĝis ekzpozicio pri ceramiko, kie hazarde ni renkontis Espe-



(El *La nova plena ilustrita vortaro de Esperanto*. Parizo: SAT, 2002.)

ranto-familion, kaj ni ĉiuj interparolis inkluzive de ilia 12-jaraĝa filo. Poste ni tagmanĝis ĉe la hejmo de Marie-Rose kune kun ŝiaj gastoj de Ingleton, kaj sekvis festo ĉe la domo de Micheline. Plua ekskurseto okazis ĝis vikinga urbo La Roche-Bernard, kie, krom antikvaj kanonoj kaj vidindaĵoj, ni vidis multajn jaĥtojn, boatojn kaj havenojn ĉe la apuda rivero Vilaine.

De tiu malnova urbo Jean-Yves ŝoforis nin laŭ kamparaj vilaĝoj, kaj survoje ni rimarkis multajn domojn, kiuj havas kantegmentojn pro la proksimeco de la marĉoj kun abundaj fragmitoj.

Ĉe la hejmo de Nicole ni vespermanĝis inter granda grupo da gastoj kaj gastigantoj, kaj je la 11-a ptm ni forlasis tiun lastan feston por paki la valizojn, skribi bondezirojn en gastlibro, ricevi esperantaĵojn de niaj gastigantoj por prezenti reciproke al Esperanto-grupanoj en Skipton kaj prepari nian foriron frue matene. Je la 6-a atm ni adiaŭis kaj forlasis La Chapelle-des-Marais por hejmeniri dum lundo, feritago en Britio.

Ni opinias, ke la tuta vizito estis ege ĝuinda kaj sukcesa dank' al organizantoj, gastigantoj, kunvojaĝantoj – kaj sendube Esperanto.

June Campbell kaj
Edith Sheldrick

Memore al Eric Revill

Estimata redaktoro,

Mi bedaŭras la someran morton de Eric Revill, kies nomon mi certe karmemore rekonas. Mi deziras sendi mian kondolencon ne rekte sed pere de vi, por ke mi povu indiki, inter la aktivoj menciitaj en *EAB-Ĝisdate* n-ro 42, lian helpon dum multaj jaroj kiel fideikomiso de NoJEF, kaj ke interesatoj legontoj povu simpatie ĉagreniĝi.

Katelino Halo,
Oksfordo



'Who cares?'

Dear Geoffrey,

Who cares? I have been an Esperantist since 1985 and am secretary of the South London Esperanto Group, which was founded by Annice Szrajbman, Philip and Greta Buttinger, and myself in 1988. Recently I have been undergoing several health challenges which have somewhat interfered with my Esperanto activities, although I have endeavoured to persevere as much as I can. Following a vicious and violent assault in February 2007 by an assistant priest at a church where I used to play the organ, I am now practically blind in my right eye. Initially people showed great concern and used to phone me or write to me regularly to ask how I was getting on. Now, very few bother. Who cares? I also have a serious problem with an underactive thyroid gland and am on a very high dosage of medication. It might be necessary for me to have an operation in the near future. Who cares?

Many of our group members are elderly, infirm, housebound, or have mobility problems, which prevent them from attending meetings and events. Who cares? Others might just be too busy with work or not have

enough free time. Who cares? But does that mean that they should be forgotten or ignored. The same scenario probably applies to other groups too.

I have met quite a few of our members, but there are many more whom I have never met and probably never will. At least once or twice a week I make it a point to either call someone in our group or send a short letter by post, just to say 'hello', ask how they are, and inform them about our group's recent activities. The people to whom I have spoken appear to be grateful for some contact from a fellow Esperantist, they are happy to know that they have not been forgotten, and they also update me on their own current circumstances.

It doesn't take much effort, and I would therefore like to urge everyone regularly to just pick up the phone and call someone in Esperantujo or send a note or card by post, especially if you know that they are elderly, infirm, ill, housebound or have little contact with other Esperantists. We are one big family, and this is supposed to be the 'lingvo de amikeco', but surely we can make it the 'lingvo de zorgeco' too!

Gregory Porilo



Reagu al la reteja televido de la Eŭropa Parlamento

Saluton al ĉiuj,

EuroparlTV estas reteja televidkanalo de la Eŭropa Parlamento, kiu ekfunkciis ekde la 17-a de septembro en pli ol dudek lingvoj ĉe www.europarl.tv.europa.eu. Jen bela okazo gratuli al la Eŭropa Parlamento pro ĝia subteno de la multlingveco de Eŭropo.

Do mi proponas du agojn, kiujn vi – jes, vi! – povas fari: – nun, sendu gratulan

mesaĝon en via lingvo pro la subteno de eŭropa multlingveco esprimita de tiu projekto (ekz. "Kiel eŭropano kaj esperantisto kun konatoj en plej diversaj eŭropaj landoj, mi tre ĝuas, ke mi povos rekomendi al ili programojn sialingvajn pri eŭropaj temoj"). La adreso de la brita oficejo estas eplondon@europarl.europa.eu, sed la respondeculo pri ĉio rilata al "TV Web" estas Peter Lindberg (rete: peter.lindberg@europarl.europa.eu). Vi eventuale trovu lokan oficejon kaj kontaktadreson.

– ekde la venonta semajno, vizitu de tempo al tempo la retejon de la televidkanalo, spektu programon, kaj sendu al ili vian opinion pri ĝi kiel ili petis (sen maltrafi la okazon menciigi la rilaton inter la programo kaj viaj spertoj en Esperantio).

Tim Morley



Ĉu tia pola-brita kunlaborado eblus?

Karaj samideanoj,

Mi lastatempe legis en la interreto, ke britoj lernas la polan lingvon por kontakti polojn laborantajn en Britio. Jen el la artikolo de brita gazeto: 'en la pasinta jaro, komenca kurso de la pola ĉe Universitato de Cardiff estis tiel populara, ke ĉi-jare oni enkondukis pli da klasoj kaj kurson por progresintoj.'

En tiu loko oni povas sperti lingvajn barojn. Mi pensas, ke tie estas loko por agado de esperantistoj. Mi havas jenan ideon.

En loko, kie laboras poloj oni povas proponi al ili lerni Esperanton helpe de pola Esperanto-instruisto kaj inverse proponi al britoj lerni Esperanton helpe de brita Esperanto-instruisto. La instruistoj devas kunlabori. Kiam la lernantoj atingos sufiĉe bonan nivelon por kompreni la lingvon,

Daŭrigo sur paĝo 17

- *Ne forgesu montri vian solidarecon kun la tutmonda esperantistaro per via membriĝo kaj daŭra subteno al la laboro de nia internacia organizaĵo*
- *Eblas pagi membrecojn por EAB kaj UEA kune*

UEA-kotizoj por 2009

Kerna servo de UEA estas organizi la ĉiujaran Universalan Kongreson de Esperanto (UK) tra la mondo, je kies kotizo individua membro ricevas rabaton. UEA funkciigas ankaŭ la plej grandan libroservon de Esperantaj libroj (pli ol 4 000 diversaj libroj kaj varoj), pri kiu haveblas 190-paĝa presita katalogo kaj ttt-paĝaro (www.uea.org/katalogo). Kaj pli grave, UEA agadas por Esperanto sur la monda scenejo. Por pli detalaj informoj, oni konsultu la Jarlibron de UEA kaj la revuon *Esperanto*, kiujn ricevas individuaj membroj.

Fariĝi individua membro de UEA

Eblas pagi por individua membreco rekte al UEA per kreditkarto (Visa, Eurocard, Mastercard, Access aŭ American Express), al nederlanda poŝtgira konto 37 89 64 (Den Haag) aŭ al la banko Bank Mees Pierson, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam, Nederlando (konto 25.52.89.804).

Alternative, oni povas pagi al la brita Peranto de UEA, kiu akceptas britan ĉekon aŭ poŝtmandaton kondiĉe ke ĉi tiu estas skribita al 'EAB', kio ebligas pagi ankaŭ kotizon al EAB samtempe: EAB, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Tel. 0845 230 1887; retadreso: eab@esperanto-gb.org. (Oni ne sendu britan ĉekon rekte al UEA.)

En la okazo se vi estas **nova membro**, bonvolu doni viajn plenajn nomon, adreson kaj, se vi havas **29 aŭ malpli da jaroj**, ankaŭ vian naskiĝjaron*. Ciuokaze bonvolu klare indiki la celon de la pago. Por aniĝi oni ne postulas plenigon de oficiala formularo.



Kotizoj de UEA por 2009

MG/Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado	£7
MJ(-T*)/Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO* (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) kun la revuo <i>Kontakto</i> sen plia abonpago)	£18
MA(-T*)/Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus <i>Esperanto</i>	£45
SA/Simpla abonanto al la revuo <i>Esperanto</i> sen membreco	£29
Kto/Abono al la revuo <i>Kontakto</i> sen membreco	£18
SZ/Societo Zamenhof: aldona, mecenata kategorio, kiu ne inkluzivas membrecon	£90

Kongres-aligoj kaj aliaj pagoj

La Peranto (EAB) povas akcepti pagojn (kvankam ne per kreditkarto) ankaŭ por la Universala Kongreso de Esperanto (UK) kaj la Libroservo de UEA, por kiuj celoj la administrejo de UEA eventuale malfermos por vi personan konton ĉe la Centra Oficejo (CO) en Nederlando. Bonvolu noti, ke la kongresajn kotizojn oni ne fiksas en pundoj, do ilia valoro varias laŭ la taga kurzo. Estas plej avantaĝe aliĝi antaŭ la antaŭa jarfino. La Peranto kutime disponas pri kongresaj aliĝiloj kaj la Unua Bulteno de la UK, sed ne pri librokatalogoj.

Aliĝu frue al la UK en Bjalistoko por ricevi **maksimuman rabaton**: € 160 antaŭ la 31-a de decembro por anoj de UEA, sed € 200 por nemembroj.

☆ **Universala Esperanto-Asocio**: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Tel. 00-31-10-436-1044; fakse: 00-31-10-436-1751; rete: uea@co.uea.org; sekretario@co.uea.org; financoj@co.uea.org; kongresoj@co.uea.org; uk.mendoj@co.uea.org; libroservo@co.uea.org; ttt-paĝaro: www.uea.org

Daŭrigo de sur paĝo 15

la klasoj povus esti kunligitaj, por ke ĉiuj povu konversacii kaj havi helpon de du instruistoj.

Kiajn paŝojn oni devus fari?

1. Oni trovu lokon, kie estas sufiĉe granda nombro da poŝtoj laborantaj en britaj entreprenoj.
2. Oni esploru, ĉu tie estas lingva problemoj kaj ĉu estas volontuloj por lerni Esperanton (la lingvon oni povas proponi ne nur al la laboristaro, sed ankaŭ por estroj de entreprenoj).
3. Oni trovu Esperanto-instruistojn (polan kaj britan) pretajn tie instrui kaj eble iomete labori en entreprenoj por ricevi sufiĉajn monrimedojn por sin vivteni tie. Mi persone povus

veni tien por instrui Esperanton al poŝtoj dum proksimume tri semajnoj (mi dediĉus por ĉi tio mian libertempon), se mi ankaŭ ricevus monon de entreprenoj por tiea vivtenado.

Oni povus proponi la retpaŝaron 'eklaboru' al entreprenaj estroj ellernintaj Esperanton. Tie ili eventuale povus proponi laboron al eksterlandaj esperantistoj pretaj labori en la entreprenoj.

Mi estas foje skajpe atingebla sub la jena adreso: stanislaw 525.

Stanisław Staszewski
ul. Moniuszki 2

PL-95-070 Aleksandrów Łódzki
Rete: stanislaw25@o2.pl

MALLONGE

IN SHORT

• **Brita kunlaboro kun Herzberg**
Okazis lastatempe tiom da aferoj en la Esperanto-urbo Herzberg en Germanio, ke ni listigas sole kelkajn ĉefajn:

Naŭ infanoj kun gepatroj kaj tri geinstruistoj de la baza lernejo Bar Hill ĉe Kembrigo, Britio, vizitis fine de aŭgusto 2008. Grandparte ili trovis gastiggepatrojn. Okazis bonaj kontaktvizitoj kun ekskursoj, komunaj festoj kaj kun instruado de Esperanto fare de Tim Morley en

la baza lernejo Nicolai. La sukcesan projekton kunlabore kun EAB sub la ŝildo de Lingvolanĉilo oni daŭrigos dum la venontaj jaroj.

La lingvoinstruisto de la gimnazio en Herzberg, Christopher Koch, partoprenis kun du gelnantoj la Internacian Infanan Kongreson en Oostvorne, Nederlando.

En Aŭgusto okazis la 3-a Somera Arbara Lernejo en Jemiarno ĉe Góra, Pollando, kun dudek gelnantoj el Herzberg kaj Góra.

Aperis du koloraj turismaj broŝuroj pri Herzberg kun rondvojo kaj pri turismaj allogaĵoj.

La urbo disponigas por volontuloj kaj honoroficaj Esperanto-helpantoj novan loĝejon kun laboreblecoj en la domo de la fajrobrigado.

Interkultura Tago en Herzberg la 6-an de septembro kun Esperanto-informbudo allogis multajn infanojn, kiuj jam scipovas saluti en Esperanto, dum aliaj petas Esperanto-kursojn.

Multaj homoj ĝojas pri Herzberg kun sia speciala trajto: ekfunkciado kiel oficiala Esperanto-urbo.

• **On Marconi in Esperanto**

The Marconi Centre at Poldhu, owned by the National Trust, but opened by volunteers from Poldhu Amateur Radio Club, runs a presentation for visitors on Guglielmo Marconi's first transatlantic radio transmission, to Newfoundland, from there in 1901. The centre's printed, laminated help sheet in several languages now includes Esperanto as well. Their website is www.gb2gm.org.uk. (Information from Yannick Dumoulin.)

• **Nova Esperanto-muzeo ĉeĥa**


Oni la 20-an de septembro fondis novan Esperanto-muzeon en la ĉeĥa urbo Svitavy. Oni petas sendi reagon al la retpaŝado <esperanto@muzeum.svitavy.cz> kaj kopie al <muzeum@esperanto.cz> (cele al traduko ĉeĥen), por ke la urbaj instancoj vidu, ke la Esperanto-muzeo vere helpas efektive propagandi la urbon en la mondo kaj do ke la muzeo restu vere daŭra, kiel promesite flanke de la nunaj urbaj gvidorganoj.

Ne gravas, ĉu estos gratulo, aŭ promeso, ke dum via eventuala vizito al Ĉeĥio vi strebos viziti ĝin, aŭ simpla montrado de konscio, ke en la urbo Svitavy troviĝas nova Esperanto-muzeo.

La projekto realiĝis dank' al financa partopreno de la Ministerio pri Kulturo de Ĉeĥa Respubliko kaj Esperantic Studies Foundation, Usono.

• **Festi kun fervojistoj en Triesto**

La 61-a IFEF-Kongreso okazos en Triesto, Italio, de la 23-a ĝis la 29-a de majo 2009. Maro, montoj, milda temperaturo kaj granda festado okaze de la 100-jariĝo de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio atendas vin, kiel ankaŭ fakaj (kaj ne-fakaj) prelegoj, konatiĝo kun loka kulturo, ekskursoj province kaj regione en Esperanta etoso. Oni bonvenigas ĉiujn esperantistojn, ĉu fervojistaj ĉu ne-fervojistaj. Pliaj informoj haveblas ĉe www.ifef.net, kaj retroŝte de Triesta




• Now Norfolk dialect is appearing on road signs! Residents of Wiveton in north Norfolk think a more conventional sign would spoil their picturesque village. "Slow you down, bor, and keep you a-troshin!"

humuro

"Akuzato, kial vi ŝtelis la aŭton?"
 "Ĉar mi rapide devis aperi en la laborejo!"
 "Kial vi ne iris per buso?"
 "Buson mi tamen ne kuraĝis ŝteli."

"Mi testamentis mian cerbon al hospitalo."
 "Kaj kiel reagis la hospitalo?"
 "Ili estas tre dankemaj pro ĉiuj bagatelaĵoj."



"Diru, kara fraŭlino, ĉu vi havas partneron por la sekva danco?"
 "Ankoraŭ ne."
 "Bonvolu do gardi mian bieron ĝis mi revenos."



"Sankta Ĉielo! Kio okazis al via mano?"
 "Mordis ĝin hundo."
 "Ĉu vi desinfektis ĝin?"
 "Ne, ĝi forkuris."

Sinjoro Kovaĉ estas maljuna fraŭlo, sed li volas edziĝi.
 Li diras al la amiko:
 "Mi volas edzinigi virinon, kies ĉiuj ecoj estas kontraŭaj al la miaj."
 "Ne estas malfacile. Ja la mondo estas plena de belaj kaj inteligentaj virinoj."

• If you would like to subscribe to *Juna Amiko*, send just £10 to the EAB office (Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE) with your name and address, or order on-line at www.esperanto-gb.org.

Diversaj agadoj

La somera renkontiĝo de JEB Lokazis ĉi-jare en la pitoreska urbo Buxton inter la 19-a kaj 20-a de julio. Malgraŭ niaj plej bonaj klopodoj inviti membrojn, nur kvin homoj ĉestis. Tim Owen, Daniel White, Mikeo Seaton, Marteno Minić kaj Clare Hunter tamen ege ĝuis la semajnfinojn, kaj kvankam la vetero ne estis perfekta, ni certe spertis malpli da pluvo ol pasintjare.

Atingis la supron

Sabato estis trankvila tago, dum kiu ni kaptis la okazon esplori niajn belajn ĉirkaŭaĵojn kaj babilis Esperante ĝis la frua mateno. Sed Buxton ja troviĝas en la mezo de bela kamparo, kaj dimanĉon ni do decidis iom marŝi en la lokaj montoj. Kun mapo kaj fortaj botoj ni ekis trans la erikejon, kaj Tim bone distris nin per senĉesa kantado de la klasika 'Verdaj la junkoj, ho!' Iomete lacaj, ni finfine atingis nian celon, Shining Tor, la plej alta pinto en Cheshire. La panoramo vere estis belega, sed pro la forta vento ni baldaŭ devis malsupreniri por revarmiĝi en trinkejo.

Internacia Junulara Kongreso

La sekvan sabaton komenciĝis la Internacia Junulara Kongreso



Tim Owen kaj Marteno Minić survoje al Shining Tor. Malsupre: Pruvo ke Marteno kaj Clare Hunter atingis la supron.

(IJK), kaj naŭ homoj vojaĝis el Britio al la hungara urbo Szombathely (som-bat-ej). Por Thomas Preece, Guy Johnston kaj Clare Hunter tiu estis la unua ebleco partopreni veran internacian renkontiĝon, kaj pro tio ili ege ekscitiĝis. Ni ĉiuj pasigis agrablan kaj interesan semajnon en bela loko, sed dum Thomas dormis kaj la aliaj JEBanoj festis, Rolf Fantom laboris.

Kune kun Martin Sawitzki el Germanio, Rolf gvidis la kurson 'Aktivula Trejnado', kiu celis helpi al esperantistoj pli lerte organizi agadon en siaj naciaj asocioj. Dum kelkaj sesioj, ĉirkaŭ 60 partoprenantoj diskutis pri diversaj temoj, ekzemple la plej bona maniero helpi komencantojn.

Kompreneble Rolf ankaŭ strebis reklami la Internacian Seminarion (IS). Al Szombathely li kunportis dekojn da afiŝoj, kiujn kreis JEBano Tim Owen, por sciigi ĉiujn partoprenantojn, ke la temo de la venonta IS estos 'Katastrofoj'. Tiuj certe estis la plej buntaj kaj profesiaj afiŝoj, kiujn ni vidis dum la tuta aranĝo, sed por Rolf eĉ tio ne sufiĉis, kaj merkredon vespere li organizis

apartan programon por pli kreeme varbi por la IS.

La brita kvizo 'La plej malforta ĉenero' nun estas konata tra la mondo, kaj Rolf perfekte prenis la rolon de Anne Robinson en nova Esperanta versio. Ĉiuj partoprenantoj portis la oficialajn T-ĉemizojn de la IS, kiujn kreis Tim Owen, kaj ĉiuj poentoj reprezentis rabaton de la IS-kotizo. Ĝi estis tre spektinda afero – laŭ mi certe la plej amuza kontribuo al la vespera programo.

IJK-Komisiono

Dum la pliparto el ni bedaŭrinde devis reveni al Britio, Rolf kaj Petra kaptis la okazon ĉeesti ankaŭ MIRON, pli ripozan aranĝon, kiu okazis en Duga Resa, Kroatio. Por Rolf la libertempo estis utila okazo starigi la 'IJK-Komisionon' – grupon de spertuloj, kiuj respondecos pri kongresa organizado post 2010.

La celo de la grupo estas helpi al la loka teamo kaj tiel plifaciligi kaj profesiigi la organizadon de venontaj eventoj. La lokaj teamoj povos koncentriĝi pri lokaj aferoj kaj ne plu devos investi tempon por lerni kaj okupiĝi pri administraj aferoj. Ni deziras al li



bonŝancon kun ĉi tiu nova entrepreno!

Aliaj agadoj

Komprenoble ankaŭ aliaj JEB-anoj daŭre aktivas.

Tim Owen lastatempe pasigis tempon kun hungara reprezentanto de SEL, la Skolta Esperanto-Ligo, kiam ili pridiskutis manierojn pli videbligi Esperanton okaze de la sekvonta jamboreo en Svedio en 2011.

Guy Johnston nuntempe klopodas revigligi la Notinghaman Esperanto-Grupon. Ĉiuj, kiuj interesiĝas pri Esperanto en la orientaj mezlandoj, estas bonvenaj viziti la novan retpaĝaron ĉe <http://notinghamo.wordpress.com/> kaj aliĝi al la diskutlisto. Dum la venontaj monatoj, Guy celas pligrandigi la

membraron kaj organizi lokajn renkontiĝojn.

Ankaŭ JEB mem havas interesajn planojn por la aŭtuno. Ni esperas krei aron da flugfolioj, kiujn ni povos sendi al novaj membroj por pli bone informi ilin pri la brita Esperantomovado. Ni intencas fari kelkajn ŝanĝojn al nia retpaĝaro, por ke estu pli facile scii, kiom da membroj ni fakte havas.

Ni ŝatus eldoni apartan numeron de nia bulneto *Saluton!* por disdoni dum la Londona Lingva Ekspozicio, kaj jam pridiskutas la bezonatajn artikolojn. Kaj, komprenoble, ni intencas kunveni almenaŭ unufoje dum la venonta aŭtuno.

Ĉiuj estas bonvenaj – venu al la forumoj por sciigi nin pri viaj preferataj loko kaj semajnfino!

Clare Hunter

MALLONGE

IN SHORT

Daŭrigo de sur paĝo 17

Esperanto-Asocio: noredv@tele2.it kaj testudo.ts@gmail.com. (Informis Elda Doerfler.)

• Instruado – alispeca uzo de la internacia lingvo?

Nun ĉe Universitato de Nankino (Nanjing) en Ĉinio estiĝas, eble por la unua fojo en profesia lingvotestado, testo, kiu okazas plejparte Esperante, pri kapableco lerni fremdan lingvon en posta kurso, do jen eble alispeca

uzo de la internacia lingvo.

La estigo de tiu ideo devenas de s-ino Cui Jianhua, vicestrino de la Fako pri Aplikataj Fremdaj lingvoj ĉe Universitato de Nankino, unu el la plej prestiĝaj universitatoj en Ĉinio. La konkreta realigo de ekzamenoj kaj la enhavigo de la testo pri lernokapablo devenas de Dennis Keefe. Ili jam provis la teston kun dek ok gelernantoj, kaj pro la sukceso de la provoj, la universitato decidis starigi dek

MALLONGE

novajn test-sesiojn en julio.

La testo parte baziĝas sur la principaro de la Baza Esperantokurso (laŭŝtupa progresigo, aktiva kontrolo post instruado ktp), kaj speciale baziĝas sur la ekzercaro PEPAS (modifita Baza Esperanto-kurso, kiu pli fidele spegulas la lernad-stilon de la pliparto de la aziaj lernantoj). La enhavon de la testo oni ŝanĝas okaze de ĉiu apliko. (Referencoj: www.linguafest.info; www.bekkurso.info; www.tritiko.cn. Informis Dennis Keefe.)

• Somerkursaro en Aŭstralio

Aŭstralia Esperanto-Asocio invitas al sia 24-a Somerkursaro, kiu okazos en Sidnejo inter la 11-a kaj 25-a de januaro 2009 ĉe International House (www.usyd.edu.au/internationalhouse), urbocentra loĝejo de internaciaj studentoj de Universitato de Sidnejo. Demandojn oni povas fari al: aesk@esperanto.org.au (AEA, Esperanto-Domo, 143 Lawson Street, Redfern NSW 2016, Aŭstralio).

• Interkompreniĝo inter najbaraj lingvoj

Aperis franclingva kolektiva verko pri 'Interkompreniĝo inter najbaraj lingvoj'. Dek ok aŭtoroj kontribuis al la 408-paĝa libro, kun antaŭparolo de Bernard Cassen. La detaloj estas: *S'entendre entre langues voisines : vers l'intercompréhension*. Chêne-Bourg: Georg, 2008. ISBN 978-2-8257-0947-4.

• Muziko el Argentino

La konata argentina muzikisto Alejandro Cossavella invitas al aŭskultado de liaj novaj surbendigoj ĉe sia retpaĝaro www.alejandrocossavella.ipernity.com.

• History of Esperanto Way in Norwich

On 19 July the main Eastern Counties newspaper, the *Eastern Daily Press*, published a version of the 'convoluted' history of



Viditaj ĉe la ĵusa Universala Kongreso en Roterdamo!

'Esperanto Way' in Norwich, which was initiated by Alderman E.F. Dean on the occasion of the 50th British Congress of Esperanto in Norwich in 1968. Alderman Dean was also the founder of the Norwich Jubilee Esperanto Foundation (NoJEF). There was a long local dispute as to whether Esperanto Way was a new way of renaming 'Lady Lane'. After the 1960s city library was destroyed by fire in the late 1990s, the new Forum building, housing the library, local BBC broadcasting offices, etc., was built over the site, unfortunately consigning Esperanto Way in Norwich to history.

• **Gratulon, Miland!**

EAB-membro Miland Joshi sukcesis kun la noto 'Bona' en la meznivelaj ekzamenoj de ILEI, kiujn li faris dum la Universala Kongreso en Roterdamo. ☐

CONGRATULATIONS!

EAB member George Durham, Benfleet, celebrated his 100th birthday in June 2007. Many congratulations!

New members

Michael Ablett, Danbury
Ms Melanie Evans, Bristol
David Ingram, London
D.L. Mccarney, Pontypridd
Robert Taylor, York
K. Wilson, London
C.J. Wilton, Stoke-on-Trent

New Supporters

Elaine Thornton, Ilkley
Alan Watkins, Stourbridge

Deceased Member

Norah Brown, Brentwood

Completed the Free Postal Course

Jenny Ingham, Ferndown
Susan Kennard, Halesowen
Alasdair MacCaluim, Glasgow
Dennis Pitchforth, Hemel Hempstead

Library presentation in Skipton

In the name of Skipton Esperanto Group, Malcolm Jones presents a copy of *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto* to

Claire Thompson, head of the town library. Thanks for the photo to Sylvain Fontaine, guest from Dijon, twin town of the York region.



Esperanto en Milton Keynes

Je la 12-a de julio kunvenis ok esperantistoj el diversaj najbaraj urboj ĉe Terry kaj Anica Page en la nova urbo Milton Keynes.

Post kiam la partoprenantoj babilis, konatiĝis kaj manĝis kune, Joyce Bunting faris interesan kaj aktualan prelegon >



La kunvenintoj el Milton Keynes estas (de maldekstre) Ian Roberts, Joyce Bunting, Elizabeth Beskine, Roland England, John Loughran, Anica Page, Arturo Sly. Fotis Terry Page.

pri la ŝanĝo de tradicia farm-bieno apud Harpenden en naturmedi-amikan, senkarbonan establon. Interalie la aŭskultantoj lernis pri la utiligado de la plantoj miskanto kaj vimeno kiel brulaĵo.

Por la sekva etapo de la kunveno la partoprenantoj lasis la domon kaj konatiĝis kun la ĉirkaŭaĵo, dum ili serĉis la respondojn al diversaj rimenigmoj pretigitaj de siaj gastigantoj. Oni apenaŭ eliris, kiam ekpluvis, sed feliĉe la suno reaperis, kaj oni partoprenis agrablajn promenon, kiu ebligis belan okazon por paroli Esperanton.

Denove ĉe Terry kaj Anica, la partoprenantoj trinkis teon, salutis pere de kartoj esperantistojn, kiuj ial ne povis ĉeesti la kunvenon, kaj komenciĝis forumo pri la malaperinta Sud-Mezlanda Esperanto-Federacio (SMEF). Arturo Sly, kies gepatro tre agemis en la Federacio, rakontis mallongan historion pri la SMEF, kaj oni interŝanĝis memorojn. Poste, la forumantoj priparolis la eblon revivigi ĝin, atentaj pri la alfrontendaj malfacilaĵoj: la granda regiono, kiun ampleksas la Federacio, kaj la serĉado pri taŭgaj kunvenejoj, alvitureblaj de partoprenantoj. Malgraŭ tio, la forumo finiĝis pozitive.

Entute, interesa, distra posttagmezo organizita de simpatiaj kaj atentaj gastigantoj, kiu espereble reokazos.

Ian Roberts

• **GROUPS AND FEDERATIONS.**
You are invited to take part in the Barlaston 'Ni Festivalu!' weekend.
See pages 9-10 and the enclosed leaflet.

Invitation to NW Federation annual Autumn Meeting

The NW Esperanto Federation will be holding its next Autumn Meeting on Saturday, 4 October at the Eaton Hotel, Chester.

Arrival after 11 am. Prize raffle tickets and used books will be on sale. A full buffet lunch will be served from around 12.30 pm. After lunch, there will be a short committee meeting, then the guest speaker, Malcolm Jones, will deliver this year's Memorial speech in honour of Antonia Rostron Van Ess on 'Comenius – the Man and the Project'. Project Comenius encourages partnerships between schools within the EU.

After Malcolm's talk, there will be a break for tea or coffee, and the prize draw. Then there will be two conversation groups until the meeting ends around 5.45 pm.

The charge is £10 for the lunch and afternoon tea or coffee. Please send your cheque payable to: 'North West Esperanto Federation'.

Particularly welcome are newcomers and those who are from other regions and abroad. Amike salutas Ian Mac Dowall (Sekretario/kasisto), 40 Danehurst Road, Wallasey CH45 3JJ. Tel. (0151) 638 6802.

Esperanto en Notinghamo

Guy Johnston nuntempe klopodas revigligi la Notinghaman Esperanto-Grupon. Ĉiuj,

kiuj interesiĝas pri Esperanto en la orientaj mezlandoj, estas bonvenaj viziti la novan retpaĝaron ĉe <http://notinghamo.wordpress.com/> kaj aliĝi al la diskutlisto.

Obituaries

Norah Brown was cremated at Rochdale Crematorium on 26 August 2008. The service was conducted by Paul Costello of the British Humanist Association. Present were Mark and Sue Brown, David Kelso, Kimie Markarian, Stephen Thompson, Ian MacDowall, Terry and Anica Page, Malcolm Jones, Edith Sheldrick, Arturo Prent, Graham Blakey.

Here are extracts from David Kelso's oration on behalf of the Esperanto community, of which she was a much-loved member – as has been evident from many expressions of affection.

Two images of Norah emerge from these messages. On the one



Norah Brown

hand, Norah was a person of passionate convictions, who did not easily accept 'lazy orthodoxy'. 'Direct and challenging' was how one friend put it – and that was a compliment, that was

why he was so fond of her and why he, like all of us, will so miss her contributions to the Esperanto world. The other image was Norah's concern for the weak, the timid, the often overlooked. Norah wasn't impressed by the grand, the famous, the self-important. She was, though, aware of those who hang back at gatherings, perhaps through shyness, awkwardness, or because they don't speak Esperanto very well. Norah spoke to everyone on equal terms – Kings and Commoners. Much of that, I suspect, came from her early years in India.

Each of us has a particular memory of Norah. In Scotland, where she was a regular attendee at Esperanto gatherings, we remember with particular fondness the charming talk she gave at the congress in Peebles, 2004.

It seems appropriate to add a few words in Esperanto, the language that played such a large part in Norah's life. Laŭ mia kompreno, geamikoj, Norah ne estis verdire esperantisto, sed esperantano. Ŝi ofte insistis ke, por ŝi, Esperanto estas ne religio, nek ideologio, sed lingvo, komunikilo inter homoj el ĉiuj mondopartoj, ĉiuj rasoj kaj klasoj, ĉiuj tavoloj de klerigo. Per Esperanto Norah vojaĝis tra multaj landoj, renkontis multajn diversajn homojn. Por ŝi, tio pli gravis ol la propagando, la organizado – kvankam ŝi bone kontribuis al la Londona Klubo kaj kiel kasisto de EAB dum tre malfacila tempo.

We shall all, I know, miss Norah. We already do. However, we all have our memories to remember her by. For me, above all, those wide-ranging, spirited conversations, whether in her garden – a garden that was 100% Norah – or over a glass, or three, of whisky, at 2 o'clock in the morning.

Adiaŭ, Norah, kaj dankon!
David Kelso

Memorial Fund for Norah Brown

One of Norah's most memorable qualities was her concern for 'ordinary Esperantists' – those people who are not natural linguists, aren't brimming with self-confidence, and often hang back at Esperanto events through lack of confidence, or because they don't know anyone. Norah didn't overlook them, and many active Esperantists today are grateful for her attention and encouragement when they were learning. It therefore seems a good idea to establish a Memorial Fund in her name for just that purpose: to encourage beginners to persevere and attend courses to improve their language skills. I already have about £100 for the Fund, which will be administered by NoJEF (along with another 30 or so memorial funds); if you would like to contribute (any amount at all), please send a cheque, payable to 'NoJEF' to: David Kelso (NoJEF), 5 Craighill Road, Kilncadzow, Carlisle ML8 4QT.

Máire Mullarney (1 Sept. 1921 – 18 Aug. 2008) was a founding member of The Green Party / Comhaontas Glas and a member of South Dublin County Council for eight years. Her involvement in politics sprang from an interest in public affairs. In 1960 she joined the Language Freedom Movement, and participated in the campaign to ban corporal punishment in schools.

She was also an advocate of home schooling, a proponent of the international language Esperanto, an activist in the women's movement and founder-member of the Irish Family Planning Association, a longtime member of the National Union of Journalists and regular contributor to the Women First page of *The Irish Times* and a staunch opponent of South African apartheid.

She first encountered Esperanto in 1979, and learnt the language by reading the detective stories of Claude Piron. She saw it as her mission to bring Esperanto to the attention of as many people as possible, and claimed that any Irish person with some knowledge of another European language could be reading Esperanto in a day and fluent in a matter of months.

She was also highly generous. In 2003, she donated 20,000

euros to the Eŭropa Komunikad-centro of the European Esperanto Union in Brussels.


Esperanto led her to the Green Party which grew out of a coming together in 1981 of Friends of the Earth, opponents of experiments on animals, vegetarians, Esperantists and others. The original manifesto of the Ecology Party, forerunner of the Greens, was written on the kitchen table of her home in the Dublin suburb of Rathfarnham.

She stood for election to Dáil Éireann in the Dublin South-East Constituency but failed to win a seat. However, she succeeded in getting elected to Dublin South County Council for the Rathfarnham local electoral area in 1991 and served until 1999 when she stepped down.

Her publications include *Parents and Teachers* (1971), *Anything School Can Do You Can Do Better* (1983) and *Esperanto for Hope* (1989). Her memoir, *What about Me? A woman for whom 'one damn cause' led to another*, was published in 1992.

Several members of the Esperanto Association of Ireland were at her funeral.

(Adapted from her obituary in *The Irish Times*. There is also an article on Máire Mullarney on the pages of the Esperanto version of Wikipedia.)



Utila Estas Aliĝo estas bele produktita libro, verkita en klara kaj flua lingvaĵo, kun riĉa kvanto da fotoj el la historio de Universala Esperanto-Asocio, kiu ĉi-jare festis sian 100-jariĝon.

Post la apero de la unua libro de Zamenhof en 1887, sendube la plej grava dato en la historio de Esperanto estas la fondo de UEA dudek unu jarojn poste, en 1908. Okaze de sia 100-jara jubileo, UEA aperigis ĉi tiun eldonadon. Ĝi ne estas plena analizo de la historio de UEA, sed la tri kontribuajoj celas lumigi la historion kaj stimuli al pliaj esploroj.

La unua kontribuaĵo elstarigas la ĉefajn trajtojn de la agado de UEA dum cent jaroj. La aliaj du koncentriĝas al personoj, kiuj komence kaj dum granda parto de la ekzistado de UEA profunde influis la asocian farton: Hector Hodler kaj Ivo Lapenna.

D-ro Ulrich Lins estas historiisto, kiu estas jam bone konata pro sia gravega libro *La danĝera lingvo* (1988) pri persekutoj kontraŭ Esperanto.

Utila Estas Aliĝo de Ulrich Lins. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio, 2008. 126p. 16 x 23,5 cm. Ilustrita. ISBN 978-92-9017-105-8.

SPECIALA PREZO sole ĉe EAB, **NUR £12**, inkluzive de afranko kaj pakkostoj. Validas ĝis 30 nov. 2008.

- *Make sure media reference sections and your town, county, university or school library have a copy of this unique work of international reference in English*

Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto

- preface by Dr. Humphrey Tonkin, Professor of the Humanities and President Emeritus at the University of Hartford, Connecticut
- general introduction to Esperanto literature, its history, evolution and modern development
- individual introductions to the five periods of the literature
- over 300 individual articles on the most important writers and their work in chronological order, with biographies and critique
- sample literary texts from some of the best original authors
- an introduction to the language itself, its linguistic structure and creative capabilities, including *Esperanto from the Viewpoint of a Writer* by Claude Piron
- extensive bibliographies and index

Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto 1887-2007 by Geoffrey Sutton. New York, NY: Mondial, 2008. x + 728 pages. Format: 6" x 9" (152 x 229 mm). ISBN 978-1-59569-090-6. Price €66.00 + p.&p.

- **Place your order** online at <www.librejo.com/enciklopedio>, by fax (+1-208-361-2863), or by e-mail: informo@librejo.com. Mondial will respond promptly with information on the various means and prices of carriage. Mondial (Ulrich Becker), 203 West 107th Street, Apt. 6 C, New York, NY 10025, USA.

Resale outlets should contact Mondial (informo@librejo.com) to agree a price. Pay only after agreement on the cost of carriage. Payment may be made by US bank cheque in US\$; or by giro to a bank in Germany; or to Mondial's account at UEA, Netherlands. Also available from EAB at £52.80 + £7.50 p. & p..

